



Komencanto



Nadejda Voroncova [Kurgan, Rusio]

Arbaraj donacoj – por gajaj erinacoj!

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

julio
- aŭgusto

100-jariĝo de UEA – jubilea Universala Kongreso en Roterdamo
– Verkoj de niaj legantoj: traduko el Ĉeĥov; aŭtunaj motivoj en poeziaj verkoj
Diversaj ondoj el bunta mondo: rakonto pri Arbaro de Zamenhoff kaj invito al la
fabelkonkurso – Aforismoj, ŝercoj, anekdotoj – Gramatika leciono de J-L Tortel
– La lingva praktiko kaj impresoj pri IJKo en Hungario – Korespondu!



(72)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenill Road, Carlisle, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorská 1, CZ-696 62 Strážnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ermits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Brankovič
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Finiĝis somero kaj kune kun ĝi finiĝis ĉiuj tradiciaj so-
meraj E-aranĝoj tra la tuta mondo. Novaj impresoj, vizaĝoj
kaj nomoj de novaj kaj malnovaj amikoj restos en niaj agrab-
laj rememoroj kaj sur elektronikaj dosieroj, kiujn foje kaj re-
foje ni rerigardos dum longaj vintraj vesperoj.

La plej grava ĉi-jara somera E-aranĝo estis sendube Uni-
versala Kongreso, UK-93 en Roterdamo, dediĉita al glora ju-
bileo de nia plej amasa kaj plej estimata internacia E-
organizaĵo – Universala E-Asocio. Pro la graveco de tiu ĉi
evento en vivo de E-movado ĉi-numere ni prezentas skizan
historion de UEA. Apude, en la najbara paĝo vi povos legi
ankaŭ impresojn pri 93-a UK, kiujn sendis al la redakcio nia
leganto kaj konstanta aŭtoro Vladimir Opletajev el Rusio. Kaj
sur la antaŭlasta paĝo ĉe tradicia rubriko "Praktiko + Im-
presoj" rakontas pri Junulara Kongreso en Hungario komen-
cantino Ralina Osipova el Jekaterinburg. Por ŝi IJKo en Hun-
gario iĝis unua internacia aranĝo, kiun ŝi ĝoje kaj entuziasme
partoprenis.

Kun temo de somera ripozo estas ligita rakonto de fama
rusa verkisto kaj klasikulo Anton Ĉehov "El rememoroj de
idealisto". Ĝin vi legos en "Verkoj de niaj legantoj". Ne tre
ofte komencantoj kuraĝas traduki verkojn de klasikaj aŭtoroj,
tamen por ĉiu regulo ekzistas escepto kaj ĉi foje vi legos la
verkon, esperantigitan de Vladimir Ŝcotkin el Rusio.

Aŭtunaj motivoj estas temo de du sekvaj paĝoj ĉe rubriko
"Verkoj de niaj legantoj". Tradukversajo de Tatjana Vŝivceva
el Rusio, hajkoj de nia malnova aŭtoro el Francio Yvec Brusq
kaj poezia rakonto, unua tradukprovo de Kaĉalova Anastasija,
nova aŭtorino el Rusio, transdonas lirikan kaj eble iom mino-
ran humoron, kiun kutime elvokas aŭtuna sezono.

Ĉe la rubriko "Diversaj ondoj el bunta mondo" vi trovos
interesan materialon. Nia aŭtorino el Finnlando Raita Puhälä
rakontas pri "Arbaro de Zamenhof" kaj lige al ĝi pri la fa-
belkonkurso por infanoj. Aŭtoro de ambaŭ tiuj projektoj estas
konata finna esperantistino, tre interesa kaj entuziasmoplena
persono Aini Vääräiemi.

Tradicie J-L Tortel lerte prilumas gravajn momentojn de
E-gramatiko en sia vica prigramatika Babilado. Aforismoj kaj
anedkotoj celas pligajigi humoron de niaj legantoj. Deziran-
tojn interkonatiĝi, korespondi kaj perfektigi en esperanto invi-
tas la dorsa kovrilpaĝo de la numero.

Agrablan legadon!

La red.

Komencanto

2008 numero 4 // (72) regule aperas ekde 1998
redaktas kaj eldonas: Raja Kudrjavceva
adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio
retpoŝto: komencanto@r66.ru
abontarifo por 2009:
internacia tarifo: 18 eŭroj
orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;
aerpoŝta aldono 2 eŭroj
konto ĉe UEA: [vkud-a](https://www.uea.info)
rusia tarifo: 240 rusiaj rubloj poŝtmandate al:
Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,
Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Karaj legantoj! Ĉi-jara jubileo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas signifa evento por la tuta movado. Lige al tio ni prezentas skizitan historion de UEA.

UEA – 100 jaroj de noblaj faroj

Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas unu el la plej gravaj niaj tutmondaj esperantistaj organizaĵoj. Tion scias ĉiu esperantisto. Ĝi estis fondita en la jaro 1908, do ĉi jare UEA jubileis. 100-jariĝo de UEA estas bona okazo por prezenti ĉi tie la historion de la fondiĝo kaj ĝian pluan agadon almenaŭ skize.

Jam post la 1-a Universala Kongreso (UK) samideanoj ekvidis, ke Esperanto sen reala praktikado internacia, simple kaj klare centrigita ne havas altrovon por reale pensanta mondo. En la 2-a Kongreso en Ĝenevo en 1906 franca esperantisto Carlet proponis organizi reton de “esperantistaj konsuloj”, kiuj povus helpi diverslandajn esperantistojn dum vojaĝoj, ĉe informpetoj kaj tiel plu. Jaron post jaro inter esperantistoj sentiĝis tiu bezono koncentri la fortojn. En la tempoj de kulminanta Ido-krizo tiu konscio pri la bezono kreskis ĝis tiom, ke, por tutmonda rekono de Esperanto, en aprilo de 1908 estis fondita UEA. La fondinto estis juna svisa esperantisto Hektor Hodler, kiu volis starigi asocion, unuigantan esperantistojn de la mondo, fortigantan la solidarecon inter ili, kaj samtempe diskonigantan al ili diversajn servojn.

La unua kunveno de UEA okazis en Drezden dum la 4-a UK 1908. La tagordo enhavis la raporton de la fakoj ekzistantaj tiam (1 – administrado; 2 – konsuloj kaj oficejoj; 3 – turismo) kaj proponon pri kreo de novaj fakoj: komerco kaj industrio, instruado. La Jarlibro mem aperis antaŭ la kongreso kaj indikis la staton de UEA: 206 delegitoj, 62 esperanto-oficejoj; ĉio en 249 lokoj kaj en 23 landoj; pagintaj membroj 1223.. Ankaŭ gravas, ke UEA estis neŭtrala rilate al nacieco, religio kaj politiko. En la 5-a UK en Barcelono Zamenhof publike deklaris, ke “... UEA fariĝis la plej

grava institucio de nia movado.” Dekomence la Asocio konsistis nur el la individuaj membroj. Simpla, servopreta, malmultekosta – estis ĉefe tiuj kvalitoj, kiuj kaŭzis la rapidan kreskon de UEA. En la 1914 estis pli ol 7000 tiuj membroj. Fondinto de UEA Hodler, same kiel Zamenhof, uzis Esperanton kiel peranton por pozitivaj ŝanĝoj en la mondo. En sia broŝuro pri “Esperantismo” li esprimis sian optimisman konvinkon, ke en la dua jarcento malaperos landlimoj kaj kreskos la sento de solidareco inter homoj de diversaj landoj kaj nacioj.



Hektor Hodler - fondinto de UEA

Hodler opiniis, ke UEA per sia Asocio povas doni modelon por estonta mondo kaj esperantistoj povos eduki homaron al nova, internacia pensmaniero.

Kiel unuan etapon de la evoluo oni povas fiksi la tempon 1908 – 1912, de la fondo ĝis la tiel nomita Financa reformo, diskutita kaj akceptita en Krakovo. Evoluo de la Asocio estis videbla en la Jarlibroj: la mizeraspektan libreton de 1908, de 24 paĝoj, anstataŭis jam en 1911 broŝuro de 184 paĝoj, entenantaj 885 lokojn kun delegitoj kaj konsuloj en 47 landoj, 7804 membroj.

Sed ĉiuj membroj de UEA estis simple ŝokitaj, kiam en 1914 komenciĝis la Unua Mondmilito. Tamen baldaŭ, havante sian Centran Oficejon (CO) en neŭtrala Svis-

lando en Ĝenevo, UEA helpe de sia tutmonda delegitaro organizis grandskalan help-agadon, helpis al militkaptitoj, peris korespondadojn, entute dum la Unua Mondmilito la Centra Oficejo de UEA plenumis 100000 servojn jare. Do, por nur kelkajara ekzisto, UEA montris, je kio ĝi kapablas.

La rekono kaj prestiĝo, kiun akiris UEA post milito helpis por refoje labori por krei novan mondon kaj lokon por Esperanto en ĝi. La agado de UEA sur Esperantista kampo estis tiu deligilo inter la ankoraŭ funkciantaj organizaĵoj en kelkaj neŭtralaj landoj kaj la aktivaj esperantistoj. Regule aperis revuo “Esperanto” kun ĉiumonataj artikoloj pri tutmondaj problemoj. En 1916 aperis Jarlibro, kiu enhavis ĉefajn informojn kaj la adresaron de delegitoj. Krome aperis dufoje libreto “Esperanto dum la milito”, kiu enhavis resumon de la stato de la movado.

Pli poste aperinta Ligo de Nacioj fortigis esperojn pri nova paca epoko kaj UEA strebis uzi tiun ŝancon. Bedaŭrinde en 1920 ajro mortis Hodler, sed komencitan de li laboron daŭrigis lia amiko Edmond Privat kaj povis rekte en Ligo de Nacioj influu kampanjon favore al rekono de Esperanto. Privat estis prezidanto de UEA ekde 1924-1928. Kaj certe li estis la plej populara prezidanto en la historio de UEA, li redaktis ĝian organon, la revuon “Esperanto” de 1920 ĝis 1934, li estis ankaŭ brila oratoro kaj tiris al si multe da simpatio.

Sed la klopodoj ĉe Ligo de Nacioj faris por esperantistoj nur duone kontentigan rezulton, ne plenumiĝis multaj esperoj, kiuj ligiĝis kun la Ligo, precipe tiu, ke la Ligo povos kontraŭpezi la rivalecon de nacioj. Tiutempe por multaj ekŝajnis, ke pli gravas la agado en nacia kadro.

Fakte tiam estis streĉiteco inter la supernacia organizprincipo de UEA kaj la interesoj de la naciaj societoj. Por kelkaj jaroj la organizajn problemojn solvis tiel nomita Kontrakto de Helsinko, farita dum la UK-14. Laŭ ĝi la naciaj E-Asocioj povis havi po unu reprezentanto en la Konstanta Reprezentantaro, kiu kune kun UEA elektis la ses membrojn de Internacia Centra Komitato, kiu estis ĉefa gvidanto de la Movado, aranĝanto de la Kongresoj Universalaj kaj Fakaj. En 1932 la Kontrakto de Helsinko estis nuligita. Samtempe Esperanton komencis minaci io pli terura. En aŭgusto 1933 la 25-a UK okazis en Koln, Germanio, kaj tiu UK ŝanĝis la karakteron de UEA. Ĝi restis Tutmonda organizaĵo de la esperantistoj, sed malaperis individua membreco kiel ĉefkolono. UEA iĝis ankaŭ Federacio de la landaj asocioj, kio ŝajnis la rompon kun la Hodlera Asocio. La nova estraro sub la prezido de la franco Louis Bastien energie reĵetis aserton, ke UEA deturniĝis de sia supernacia idealo kaj toleras naciismon. La internaj malakordoj 1936 kondukis al skismo. La Komitato de UEA en marto decidis transporti la sidejon al Londono, ĉar la vivkostoj tie ŝajnis pli malaltaj ol en Ĝenevo. Kontraŭ tiu decido protestis svisaj membroj, argumentante, ke la Statuto malpermesas translokon de la Sidejo kaj transdonis la aferon al Tribunalo. Dum la UK en Vieno la Komitato anoncis la Fondon de nova asocio, kreiĝis Internacia Esperanto-Ligo (IEL), en kiu Bastien restis prezidanto. Formale UEA ekzistis plue, sed la granda plimulto de la membroj transiris kune kun preskaŭ ĉiuj landaj asocioj al IEL. Tiu disduiĝo okazis en tempo, kiam en Germanio kaj en Soveta Unio la organizita agado por Esperanto estis malpermesita. Portempe kaj UEA kaj IEL estis kvazaŭ paralizitaj pro la malfavoraj cirkonstancoj en pluraj landoj de Eŭropo.

La Dua Mondmilito, eĉ pli terura ol la Unua, multe reĵetis, eĉ en multaj landoj ŝajne tute neniigis

la E-movadon. Mankis la kontaktoj, revuoj, eldonaĵoj, unu el la ĉefaj gazetoj, la populara dusemajna gazeto "Heroldo de Esperanto" devis forlasi Germanion kaj ĝia redaktoro Teo Jung, post kiam oni konfiskis lian propran presejon en Koln, transmigris en Nederlando. En Vieno oni fermis la Internacian Esperanto-Muzeon kaj enkarcerigis ĝian fondinton kaj direktoron H.Tajner. Multaj esperantistoj fariĝis viktimoj ne nur sur la batalkampoj, sed ankaŭ en koncentrejoj.



Kiel UEA dum la Unua mond-milito, nun Internacia Esperanto-Ligo (IEL) faris sian eblon por transsavi la movadon dum la Milito. IEL havis sian sidejon en Anglio kaj ĝi povis aperigi la revuon "Esperanto Internacia" eĉ dum milito. Organizinte filian oficejon en la neŭtrala Svedio, oni povis de tie dissendi la IEL-cirkulerojn, eĉ al malamikaj landoj por teni la kontakton. Tiu helpagado demonstris ne nur la helpemon, sed ankaŭ la spitopovon de la esperantistoj.

Post la milito IEL plifortiĝis kaj en 1946 la reprezentantoj de UEA kaj IEL komencis kontrakti la reunuigon de la neŭtrala E-movado. Interkonsento realiĝis en 1947 dum la 32 UK en Bern. La du organizaĵoj kunfandiĝis sub la nomo de UEA, kies statuto estis reviziita en 1948. Nelonge post la reunuiĝo UEA lanĉis subskribo-kampanjojn por ricevi oficialan subtenon al Esperanto. Ili estis direktitaj al Unuiĝintaj Nacioj. La unua, kiun gvidis persone Ivo Lapenna en 1949-50, havigis al UEA fine de

1954 "La venkon de Montevideo". Ĝi konsistis el Rezolucio de Unesko, rekonanta la atingojn de E-movado. Malsukcesa, kontraŭe, estis la dua subskribo-kampanjo en 1965-66. Esperantistoj deziris ke UN rekomendu al siaj ŝtatoj-membroj la instruadon kaj uzadon de Esperanto, kion la Sekretaricjo de UN rifuzis pritrakti.

Ambaŭ kampanjoj evidentigis la mobilizan kapablon de Lapenna, entuziasmon de esperantistoj. En la 50-aj kaj 60-aj jaroj estis konstruata tio, kion prezidanto de UEA Ivo Lapenna (1955-64) nomis "la moderna UEA". Multo, kion li kreis kaj iniciatis, konserviĝis ĝis hodiaŭ: Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), La Belartaj Konkursoj, La Oratoro Konkurso dum UK, la libroserio "Oriento-Okcidento", Korrespondanta Servo Mondskala (KSM), TEJO-revuo "Kontakto". En 1955 okazis translokiĝo de Sidejo de la Centra Oficejo al havenurbo Roterdamo. Nun CO-on eblas viziti dum Malfermaj Tagoj.

Nun la Asocio havas la jenajn kategoriojn de membroj:

- Asociaj membroj are aligitaj de landaj aŭ fakaj asocioj;
- Individuaj membroj individue enlistigitaj de UEA;
- Honoraj membroj kaj prezidantoj.

UEA ĉiujare eldonas Jarlibron, en kiu interalie troviĝas la listo de ĉiuspecaj delegitoj de la tuta mondo, al kiuj la membroj povas sinturni, se ili bezonas helpon.

Kaj fine ni skribu pri nunaj gravaj celoj de UEA:

1. Disvastigi la uzadon de Esperanto;
2. Plifaciligi ĉiaspecajn rilatojn inter la homoj, sen diferencigo laŭ nacieco, religio, politiko aŭ lingvoj;
3. Zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj;
4. Okazigi Universalajn E-Kongresojn (UK) kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn;
5. Kreskigi inter siaj membroj la senton de solidareco kaj komprenemo kaj respekton al fremdaj popoloj;

**93a Universala Kongreso
de Esperanto**
19-26 de julio 2008

UEA 100

ROTTERDAMO

La Urbestro de Roterdamo Ivo Opstelsen en sia invitmesaĝo aparte emfazis Roterdamon kiel “mondurbon indan je malkovro”. Sed ne nur la fama havenurbo, ankaŭ la lando mem – la bela Nederlando – estis inda je malkovro, agrabla restado ĉi tie kaj kongresumado sine de Eŭropo. La unuan kongrestagon iu ĉemara veterkoboldo signis per torenta pluvo, sed en la cetera periodo la kongresurbo ĝuis serenan varman veteron, kaj ĉiuj scivolemuloj povis senĝene ekskursi kaj paŝi tra la urbo por ekkoni ĝin kaj malkovri al si ĝiajn unikajn vidindaĵojn.

La urbo disponigis al esperantistoj imponan modernan kongresejon de Beurs-WTC, kiu situas centre ĉe la ĉefa strato de Roterdamo, sed kies salono Zamenhof bedaŭrinde ne sukcesis akcepti ĉiujn ĉeestajn dezirantojn de plenkunsidoj kaj koncertaj programoj. Entute la Kongreson partoprenis 1845 personoj el 73 landoj de la mondo, sufiĉe modesta nombro kompare kun la iamaj furoraj aliĝoj al UKoj okazintaj en Eŭropo.

La duan fojon post 1988 gastigis Roterdamo la Universalan Kongreson de Esperanto. La kongresa kuriero tendencis al la jubileaj solenaĵoj kaj titoliĝis ĉi-foje tre feste “Jubileanto”. En sia unua numero ĝi publikigis la salutvortojn de Marjorie Boulton kaj ŝian poemon el la jaro 1954 dediĉitan al Roterdamo.

*“Ho, urbo de mil mastoj
kaj grizaj gruoj, ŝipoj de ĉiuj rasoj, ĉiuj kastoj
havenas en vi pace, en viaj gastamaj vastoj.*

.....
*Ho, brava urbo de kuraĝaj homoj,
printempa urbo de kreskantaj domoj,
saluton!” Vere, unika urbo!*

Sed ankaŭ la Kongreso estis unika el la historia vidpunkto, ĉar ĝia programo celis ĉiuf flankan celebradon de la 100-jariĝo de UEA – inda preteksto por pensi kaj rezoni dum la Internacia Jaro de Lingvoj pri la nuna lingva situacio en la mondo kaj pri la rolo de Esperanto en la multlingva komunikado. La usona Profesoro Humphrey Tonkin kaj Giridhar Rao el Barato, reĝisorinta la Kongresan Temon “Lingvoj: trezoro de la homaro”, en siaj inaŭguraj mesaĝoj metis plurajn demandojn, kiuj konturis la tutan spektron de la problemoj traktendaj diversdirekte dum la kongresaj kunvenoj. Fine la rezolucio de la 93-a Universala Kongreso no-

Impresoj pri la kongreso

Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]
partopreninto de UK-93

tis la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj kaj instigis ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco kaj proponis al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado.

La abunda kongresa programo cedis al ĉies gustoj kaj ofertis multon interesan, sed ne povis ja oni “multobliĝi” kaj samtempe ĉeesti en diversaj salonoj por aŭskulti famajn kaj doktajn prelegantojn dum la 61-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, Esperantologia Konferenco kaj kunvenoj de fakaj asocioj aŭ prelegoj pri la kongreslando. Tre sukcese pasis Kleriga lundo, kiu celis “intersanĝi spertojn, lerni novajn aferojn, transdoni ideojn al aliaj”. La pedagogia valoro de Esperanto estis temo de la jam tradicia Tago de la Lernejo, veniginta al la publika podio geinstruistojn de diversaj instruniveletoj por intersanĝo de spertoj, metodoj, projektoj dum fakaj prelegoj, paroligaj lecionoj kaj metiejoj. Buntan bildon de la tutmonda Esperanto-komunumo prezentis la Movada Foiro. Simila al vera foiro tumulta, gaja kaj festa, akcelanta kontaktojn sed senigita je mongajn marĉandojn, ĝi prezentis realan kaj aktualan vidaĵon de la vivo kaj funkcio de pluraj landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj. Aparte atentokapta kaj informriĉa estis la foirbudo de Pollando – organizanto de la venontjara Universala Kongreso.

Kortuŝan vesperon donacis al kongresanoj loĝantaj en la gastejo “Stayokay” la familia triopo Nataŝa, Carina kaj Ĵomart. Ili improvizis belegan koncerton por geamikoj el Rusio, sed ĝin ĉeestis ankaŭ pluraj alilandaj esperantistoj, kaj ĝi sukcesis multe pli bone ol la antaŭanoncita oficiala koncerto en la kongresejo iom fuŝita pro teknikaj malglataĵoj.

Dum la ferma ceremonio la panoraman bilancon de kongresaj eventoj kaj atingoj faris Ĝenerala Sekretario de UEA Barbara Pietrzak, kiu pozitive resumis la Kongreson kaj atentigis ĉiujn geĉeestantojn pri la vico de gravaj jubileoj invitante esperantistojn veni venontjarc al Bjalistoko por kune celebri la 150-jaran naskiĝtagon de Ludovuko Zamenhof en lia patrouro.

Antaŭ kelkaj jaroj ni jam publikigis unuajn verkojn de Vladimir Ŝcotkin. Tio estis poeziaĵoj. Post kelkjara paŭzo ni denove prezentas lian tradukon el A. Ĉeĥov. Nun Vladimir tradukas verkojn de la klasikulo, esperante iam eldoni tiajn tradukojn libroforme.

Tradukis el la rusa **Vladimir Ŝcotkin**
[Dimitrovgrad, Rusio]

Anton Ĉeĥov

El rememoroj de idealisto

La dekan de majo mi prenis feriojn por 28 tagoj, elpetis ĉe nia trezoristo cent rublojn avance kaj decidis, malgraŭ ĉio, "bonfarti" dum iu periodo, por ke poste dum eĉ dek jaroj plenigi mian vivon per tiamaj rememoroj.

Sed ĉu vi komprenas, kion signifas "bonfarti" en la plej bona senco de tiu ĉi vorto? Tio ne signifas viziti la someran teatron por spekti opereton, formanĝi vespermanĝon kaj frumatene reveni hejmen duonebria. Tio ne signifas viziti la ekspozicion kaj de tie veni al ĉevalkonkuroj kaj tie ekzameni sian sorton apud la totalizatoro. Se vi volas iom "bonfarti", tiam sidiĝu en la vagonon kaj forveturu tien, kie la aero estas plenigita per odoroj de siringo kaj padusfloroj, kie, karesante vian rigardon per sia fajna blankeco kaj brilo de diafanaj rosetoj, konkure floras la konvaloj kaj "noktaj belulinoj". Tie, en vasteco, sub ĉiela blua firmamento, postdekore de verda arbaro kaj hirlantaj riveretoj, en kompanio de birdoj kaj verdaj skaraboj vi komprenos, kio estas la vivo! Aldonu al tio ankaŭ du-tri rendezuojn kun ĉarma ĉapeleto, viglaj okuletoj kaj blanka antaŭtuko... Mi konfesas, ke pri ĉio tia mi revis, kiam kun forpermeso en la poŝo, prikaresita per malavareco de la trezoristo, mi translokiĝis en vilaon.

La somerdomon mi luis laŭ la konsilo de unu amiko, ĉe Sofja Pavlovna Knigina, kiu luigis en sia somerdomo superfluan ĉambron kun manĝoj, mebloj kaj ceteraj oportunaĵoj. La

luado de somerdomo efektiviĝis pli rapide ol mi povus tion imagi al mi. Alveninte al *Pererva** kaj trovinte la somerdomon de Knigina, mi surprénis, kiel mi memoras, en terason kaj... konfuziĝis. La teraseto estis alloga, komforta kaj admirinda, sed pli alloga kaj (permesu al mi tian esprimon) pli komforta estis juna korpulenteta sinjorino, sidanta ĉe la tablo sur la teraso kaj trinkanta teon. Ŝi duonfermetis la okuletojn en mian flankon.



- Kion vi bezonas?

- Pardonu min, bonvolu... komencis mi. - Mi... mi, verŝajne mistrafis ... Mi bezonas somerdomon de Knigina...

- Mi estas Knigina... Kion vi volas?

- Mi embarasiĝis... Pri mastrinoj de loĝejoj kaj somerdomoj mi kutime subkomprenis personojn mezaĝajn, reŭmatismajn, odorantajn per feĉo, sed ĉi tie..., "savu nin, ho, ĉielaj anĝeloj!" - kiel diris Gamleto, sidis mirakla, brilega, miriga, ravinda, ĉarmega persono. Mi, balbutante klarigis, kion mi bezonas.

- Ah, estas tre agrable! Bonvolu sidiĝi, via amiko jam skribis al mi. Ĉu vi volas teon? Ĉu vi preferas kun kremo aŭ kun citrono?

Ekzistas la ina tipo (pli ofte ili estas blondulinoj), kun kiuj sufiĉas sidi kune du-tri minutojn, por ke vi

eksentu vin kiel hejme, kvazaŭ vi estus delonge konataj. Ĝuste tia estis Sofja Pavlovna. Fintrinkante la unuan glason de teo, mi jam sciis, ke ŝi ne estas edziniĝinta, vivas el rentumo kaj atendas la onklinon gaste. Mi ekkonis la kaŭzojn, kiuj igis Sofja Pavlovna luigi unu ĉambron. Unue, pagi unu cent dudek rublojn por la somerdomo por ŝi estas multekoste kaj, due, ŝi iom timas: se subite ŝtelisto enrampos nokte aŭ tage eniros iu terura kamparano! Kaj estas nenio riproĉinda, se en la angula ĉambro loĝus iu soleca damo aŭ viro.

- Sed viro estas preferinda - suspiris la mastrino, lekante la konfitaĵon de la kulereto. - Kun viro mi havas pli malmulte da klopodoj kaj ne estas tiel danĝere...

- Unuvorte dirante, post unu horo mi kun Sofja Pavlovna jam estis amikoj.

- Ah, jen! - rememoris mi, adiaŭante ŝin. - Ĉion ni pripaŝolis, sed pri la ĉefa ne estis dirita eĉ unu vorto. Kiom ja vi prenos de mi? Ĉe vi mi loĝos nur dudek ok tagoj... Tagmanĝo, certe, kaj teo kaj cetera...

- Nu, vi trovis temon! Kiom vi povas pagi - tiom donu... Mi ja ne pro profito luigas la ĉambron, sed tiel... por esti kun homoj... ĉu dudek kvin rublojn vi povos pagi?

Mi, certe, konsentis, kaj mia eksterurba vivo komenciĝis... Tia vivo estas interesa pro tio, ke tago similis al la tago, nokto al la nokto, kaj - kiom da ĉarmo estas en tia monotoneco, kiaj la tagoj, kiaj la noktoj!

Leganto, mi estas feliĉa, permesu al mi brakumi ankaŭ vin! Matene mi vekigis kaj, tute ne pensante pri sia oficservo, trinkis teon kun kremo. Je la dekunua horo mi venadis al la mastrino gratuli ŝin okaze de la bona mateno kaj trinkis kafon kun dika tavolo de bakita kremo. Post la kafo ĝis tagmanĝo ni babilis. Tagmanĝo estis je la dua horo, sed kiaj estis tiuj tagmanĝoj! Imagu al vi, ke vi, malsata kiel hundo, sidiĝas ĉe la tablo, eltrinkas grandan glason de vodko "listovka" kaj postmanĝas ĝin per varma salita viandaĵo kun kreno. Poste, imagu al vi malvarman legoman supon aŭ okzalan barĉon kun acidlakto k.t.p., k.t.p.

Post tagmanĝo estis senzorga kuŝado, legado de romano kaj ĉiumomenta eksaltado, ĉar la mastrino tien-reen preterpaŝas la pordon kaj diras "kuŝu, kuŝu!"... Poste naĝado. Vespere ĝis malfrua nokto estas promenado kun Sofja Pavlovna... Imagu al vi, ke dum vespera horo, kiam ĉirkaŭe ĉio dormas, krom najtingaloj kaj de tempo al tempo ekkrianta ardeo, kiam malforte blovanta venteto alportas al vi apenaŭ aŭdeblan bruon de malproksima trajno, vi promenas en bosko aŭ laŭ fervoja taluso kun korpulenta blondulineto, kiu kokete movas la ŝultrojn pro la vespera malvarmeto kaj senĉese turnas al vi sian vizaĝeton, respegalantan la lunan lumon... Estas neimageble bone! Ne pasis eĉ unu semajno, kiel okazis tio, kion vi, leganto, jam delonge atendas de mi, kaj sen kio ne ekzistas eĉ unu bona rakonto. Mi ne sukcesis kontraŭstari... Miajn klarigojn Sofja Pavlovna aŭskultis indiferece, preskaŭ senemocie, kvazaŭ longe atendis ilin, nur ŝi faris allogan mienon per lipoj, kvazaŭ dezirante diri:

- Ĉu indas pri tio longe paroli, mi ne komprenas!

x x x

Dudek ok tagoj preterflugis kiel unu sekundo. Kiam finiĝis mia ripozo, mi, tristante kaj nekontentigita, adiaŭis kun la somerdomo kaj kun Sonjo. La mastrino, kiam mi pakis la valizon, sidis sur la divano kaj plorante viŝis la okuletojn. Mi mem, preskaŭ plorante, konsolis ŝin, promesante viziti ŝin dum la festotagoj kaj vintre en Moskvo.

- Ah, kiam ja ni, mia animo, kvitiĝos? - rememoris mi. - Kiom mi ŝuldas?

- Iam poste...- ploretante elparolis mia "objekto".

- Por kio poste? Ja amikeco aparte, mono aparte, - diras la proverbo. Kaj krome, mi tute ne deziras vivi el via konto. Nu, ne rifuzu, Sonjo... Kiom pagi al vi?

- Tie...iaj bagateloj... - eldiris la mastrino, plorante kaj eltirante tablan tirkeston - vi povos pagi pli malfrue, poste...

Sonjo fosis en la tirkesteto, elprenis de tie paperecon kaj donis ĝin al mi.

- Ĉu tio estas resuma kalkulo? - demandis mi. - Nu, jen estas bonege... kaj estas bonege... (mi alkroĉis okulvitrojn), ni kvitiĝos kaj bone (mi legis la fakturon). Do, sume. . . saluton!, sed kio estas tio? Sume... Sed tio estas io ne mia, Sonjo! Ĉi tie... estas "sume ducent dekdu rubloj kaj kvardekkvar kopekoj". Tiu ĉi fakturo ne estas mia!

- Via estas, karuleto mia! Vi rigardu!

- Sed de kie ja tiom? Por somerdomo kaj manĝado 25 rubloj, mi estas konsenta... por servistino 3 rubloj - nu, estu tiel, mi ankaŭ konsentas...

- Mi ne komprenas, karuleto, - prononcis emocie la mastrino, rigardante min miriginte, per plorantaj okuloj. - Ĉu vi ne kredas min? Kalkulu mem tiuokaze! Vi trinkis "listovkan"... ja mi ne povis surtabligi al vi ordinaran vodkon je la sama prezo! Kremo por teo kaj kafo, poste fragoj, kukumoj, ĉerizoj... Pri kafo ankaŭ... ja vi ne interkonsentis kun mi trinki ĝin, sed trinkis ĉiutage! Cetere, ĉio estas tiaj bagateloj, ke mi, bonvole, povas fari rabaton je dekdu rublojn. Restu sume nur ducent.

- Sed... ĉi tie estas enskribita 75 rubloj, kaj ne estas indikita pro kio... Pro kio, do?

- Kiel pro kio? Jen estas bonege!

Mi rigardis ŝian vizaĝon. Ĝi aspektis tiel sincere, klare kaj surprizite, ke mia lango jam ne povis eldiri eĉ unu vorteton. Mi donis al Sonjo cent rublojn kaj la kambion je la sama sumo, surprenis la valizon sur la ŝultrojn kaj foriris stacidomon.

Ĉu iu povas, gesinjoroj, pruntedoni al mi cent rublojn?



Bildoj sur la paĝoj de Luiza Izmailova [Kuzneck, Rusio]

* Pererva - nomo de vilao

Sur tiuj ĉi du paĝoj vi povos legi kolekton de la verkoj de diversaj aŭtoroj, en kiuj jam sentblas aŭtuna humoro..

Sofia Parnok
Esperantigis **Tatjana Vŝivceva**
[Miass, Rusio]

Gapas mi al foliaro flava

Gapas mi al foliaro flava:
Or' monera, suna flav' de vin'.
Ve, karulo, mono min ne ravas,
Estu riĉa, se preferas vi!

Mi ne vivas – nure rolas vivon –
Estu song', aŭ realeca klar'.
En komunloĝeja perspektivo
Sentas min mi kvazaŭ en kampar'.

Ĉu pli hele suno lumas ie?
Aŭ pli diafanas laga ond'?
Ĝojas mi, samidean' translima,
Kaj feliĉas pro ĉi tia sort'.

Mi ne kredas, ke malantaŭ limo
Pli odoras flava foliar'.
Tie eĉ feliĉ' ne estas mia,
Sed ĉi tie mias eĉ amar'.



Pentris **Rodina Marina** [Jurgamiŝ, Rusio]

Lenke Szasz [Rumanio]

Aŭtuna Penso

Ora kaj ruĝa flamis la arbaro en tiu fora,
fora aŭtuno, ora kaj ruĝa ankaŭ nun ĝi
estas nur en la kor' la flamo estingiĝas.

Tiu ĉi bela lirika rakonto estas unua provo de traduko al Esperanto farita de Kaĉalova Anastasija [Perma reg., Rusio]

Jekaterina Reznikova [Rusio]

Kaj poste venis aŭroro

Hieraŭ mi vidis birdojn. Ili leviĝis super la urbo, transformante en malgrandajn nigrajn punktetojn. Mi kvazaŭ sorĉigita rigardis ilin. Estis stranga sento de flugo, kvazaŭ la animo deŝiriĝis de la korpo kaj leviĝis supren kune kun tiu nigra birdaro.

Kial nigra? Ĉar tio estis nigraj kornikoj aŭ korvoj. Al mi pli plaĉas korvoj. Kaj al vi?

Ĉu vi opinias tion stulta – stari meze de la trotuaro kaj rigardi tiujn birdojn? Jes, jes. Al la korvoj. Povas esti, ke vi pravas. Jes, eble tio estas stulte. Sed sciu, al mi ekŝajnis, ke mi estis feliĉa, kiam sentis per ĉiu ĉelo de mia korpo la facilecon de la flugo. Mi pensis, ke mi ne plu ion bezonas, nur tiel flugi kaj flugi.

Kaj poste iu preterpasanto puŝis min, kaj mi subite falis.. Mi ne kulpigas lin, ja li ne povis senti tion kaj al li estus komplike kompreni, kien li ĵetis min. Mi longe ankoraŭ sidis sur la griza neĝo, provis denove ekflugi, sed jam ne povis tion fari. Ĉu vi scias, ke homoj, kiuj preterpasis min iel strange sinturnis reen kaj ion susuris unu al la alia. Mi volis aŭdi, kion ili diras, sed vidis nur grimacojn, kiuj aperadis sur iliaj vizaĝoj post iuj frazoj kaj rigardoj al mi. Poste mi ekstaris kaj iris rekte. Foje eĉ levis la kapon supren, sed la birdoj jam mankis. Kaj ankau mi mankis tie...

Kiam mi apenaŭ atingis mian domon – leviĝis plej supren kaj, mirakle: mi okazis sur la tegmento. Estis malhele. Mi sidiĝis surrante kaj pendigis la piedojn suben, levis la manojn kaj subite al mi iĝis tiel bone, kiel dum tiu ĉi mia mallonga flugo...

Kaj poste venis la aŭroro...



Petrova Jekaterina [Magnitogorsk, Rusio]

Tri aŭtunaj hajkoj

de Yves Brusq [Francio]

Aŭtuna mateno;
Ĵusfalinta folio:
kialo de hajko.

*

Amasigas la vento,
antaŭ mia pordo, la relikvojn
de l' somero: sekfoliojn.

*

Griza vastego
de l' ĉiel' super l' oro
de l' silentaj arbaroj.

Raita Pyhälä [Finlando]

Arbaro de Zamenhof

En orienta Finnlando, ĉirkaŭ 100 km de la rusa limo kaj 770 km norde de Helsinko, situas la municipo *Taivalkoski*. La regiono estas solene arbara kaj ornamas ĝin riveroj kaj lagoj. Tie, en vilaĝo Metsäkylä, de la 2000a jaro viziteblas unika Zamenhof-Esperanto-Objekto (ZEO), kiu nomiĝas *Arbaro de Zamenhof*. Ne en 2000 estis plantitaj la arboj, ili estas piceoj jam altegaj kaj iliaj pintoj etendiĝas al la ĉielo.

Per siaj branĉegoj ili ŝirmas mirte-lojn, muskojn, birdojn kaj bestetojn. Por homaj vizitantoj ili kreas belan fabelan etoson. Inter la piceoj videblas statuetoj kun Esperantaj vortoj: leporo, aglo, sciuro, heliko, pego, strigo.. kaj tiel la vizitantoj ion lernas pri la Internacia Lingvo, eĉ se ili ne antaŭe estus aŭdintaj ĝin. Ili povas sidiĝi sur benkoj, aŭskulti prelegeton kaj kunkanti E-kantojn, manĝeti kaj trinketi ĉe bivakfajro. Ĉiujare lokaj lernejoj 11-12-jaraj grupe venas kun siaj geinstruistoj kaj konatiĝas kun Esperanto.

Se venas unufoja vizitanto el iu lando, oni okazigas ceremonieton, kie li aŭ ŝi rajtas elekti arbon memore al sia lando. Poste oni pendigas sur la trunkon lignan ŝildon kun la nomo de tiu lando. Jam 18 landoj havas siajn arbojn tie: Albanio, Belgio, Ĉeĥio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Kroatio, Latvio, Litovio, Pollando, Svedio, Slovakio, Svislando, Tajlando, Usono. Se via lando mankas, rapide alvenu elekti arbon por ĝi!

La arbarposedanto, s-ino Aini Vääräniemi dediĉis la lokon al L.L. Zamenhof kaj liaj noblaj ideoj. Ŝi ankaŭ iniciatis internacian fabelkonkurson en Päätaalo-Instituto, kiu daŭras jam de 8 jaroj. Estis premiitaj fabeloj de geknaboj el 17 landoj, ekzemple tiuj de Jaroslav Vorobjov kaj Ramil Kosbiev el Rusio (instruisto s-ro Ĉupin).

Päätaalo-instituto estas edukejo por verkantoj kaj verkistoj.



Spartak Tjulohov [Jakutio, Rusio]

Invito al Esperanta Fabelkonkurso

www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm

Päätaalo-instituto estas kultura-literatura centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, nomita laŭ Kalle Päätaalo (1919-2000), eminenta verkisto naskiĝinta en Taivalkoski. Inter ĝiaj agadoj estas fabelkonkurso por finnaj infanoj ekde 1993, la plej prestiĝa tia konkurso en Finnlando.

En 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä, unu el la vilaĝoj en la municipo Taivalkoski. En 2008 ĝi okazas la sesan fojon.

Estas tri kategorioj: infanoj: ĝis 8-jaraj, 9-10-jaraj kaj 11-13-jaraj.

La konkursaĵoj devas esti verkitaj originale en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.

La ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. Fabelo estas mallonga (1-5 folioj) konsekvenca rakonto, ligita al la infana mondo kaj karakterizata de sorĉeco, mistereco kaj supernaturaj okazaĵoj, kiuj kreas atmosferon fascinantan al infanoj. Rakonto pri ĉiutagaĵoj aŭ disvolvanta temon el la reala mondo, eĉ se lerte verkita, ne estas konsiderata fabelo.

Oni sendu la konkursaĵojn poŝte je la adreso:

Päätaalo-Instituto. Fabelkonkurso.

PL 39, FI- 93401, Taivalkoski, Finnlando

Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

La rezultojn oni publikigos samtempe kun tiuj de la finna konkurso la 18-an de oktobro, kiam finnoj festas la nomtagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu branĉo estas principe tri premioj. Unu el la gajnintoj de la unua premio ricevos ankaŭ la ĉefpremion Fabelo Internacia.

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso:

S-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando. <aini.esp@pp.inet.fi>

S-ino Aini Vääräniemi afable disponigis eblecon publikigi tiujn du fabelojn, premiitajn en la pasintaj jaroj dum la konkurso.

Fabelkonkurso

Chiara Goethals, Belgio

l'abelo verkita de infano kun la kaŝnomo „Alice“

Eliska Splichalova, Ĉeĥio

(unua premio en Kategorio C, 2006)

La malbona Suno

Multaj homoj kredas, ke la Suno vivas eterne, sed tio ne estas vero. La Suno vivas tre longe, sed iam ankaŭ ŝi mortas. Antaŭ sia morto, la Suno naskas infanon. Tiu infano estas la nova Suno.

Okazis iam, ke la Suno naskis ĝemelojn. Unu el la infanoj estis bona, sed la alia estis malbona. La malbona Suno nomiĝis Alis, kaj ŝi ne povis resti en la ĉielo, ĉar tie ŝi mortus pro enuo. Do Alis venis al la Tero por fari malbonon. La nomo de la bona Suno estis Karlijn [Karlen']. Kiam Karlijn vidis, ke Alis iris teren, ŝi sekvis.

Tio okazis en iu nokto, dum mi dormis en mia lito. Subite iĝis ekstere tute hele, kaj mi vekigis. Mi rigardis la horloĝon: estis noktomezo. Kiel povas esti tiel hele en noktomezo?

Kiam mi rigardis el la fenestro, mi vidis grandan ŝuon sur la strato. Kaj poste mi vidis la Sunon: ŝi staris jam antaŭ la pordo. La Suno havis multajn brakojn kaj multajn gambojn.

Ke ŝi perdis unu ŝuon, tion ŝi tute ne rimarkis. Mi vidis, kiel la Suno formis el sia mano ŝlosilon kaj eniris en nian domon!

Mi aŭdis, ke la Suno serĉis homojn en la teretaĝo. Bone, ke niaj dormĉambroj estas en la dua kaj tria etaĝoj. Do mi havis tempon por veki mian fraton, kaj miajn gepatrojn. Poste mi devis unue lavi min en la banĉambro por finvekiĝi. Mi kuris tra la tuta granda domo, sed mi ne trovis la Sunon. Subite mi aŭdis mian Panjon krii! La Suno ĵetis ŝin el la plej alta fenestro!

Mi iris al mia frato kaj diris: "Iru supren kaj helpu nian Paĉjon, sed unue vi surmetu vian kirason, car la Suno estas tie, kaj ŝi estas tre danĝera!" Tiam mia frato unue iris al la kuirejo kaj prenis pintan tranĉilon. Sed dum tiu tempo la Suno jam mem mortigis mian Paĉjon ankaŭ per tranĉilo. Mia frato kuris kontraŭ ŝi, la tranĉilon levita por ataki.

En tiu momento, la muro de la ĉambro malfermiĝis kiel pordo, kaj Karlijn envenis. Ŝi portis belan robon, kaj sur la dorso ŝi havis flugilojn. En sia mano, Karlijn tenis sorĉbastonon. Ŝi vokis: "Haltu!", kaj mia frato ĉesis. Tiam mi venis al ŝi kaj demandis: "Ĉu vi povas forigi tiun Sunon?" Karlijn tuj svingis la bastonon, kaj Alis malaperis. La bona Suno sorĉis ŝin for al la ejo de la mortintaj sunoj, kie troviĝis ankaŭ ilia patrino. Ŝia sorĉo estis tiom forta, ke ne nur la malbona Suno ne plu ekzistas, sed ĉio estis, kvazaŭ Alis neniam ekzistis.

La bona Suno Karlijn reiris en la ĉielon, kaj leviĝis en la mateno, kiel ĉiun tagon. Ŝi vivas ankoraŭ nun, kaj ekzistos plu dum longa tempo. Sed iam ankaŭ si mortos, kaj antaŭe ricevos novan infanon.

Kial havas testudo kirason

Granda dio Zeus estis reganto de ĉiuj grekaj dioj. Li havis grandan aŭtoritaton kaj ofte li havis malbonan humoron. Tiam li ĉirkaŭjetadis fulmojn kaj aliaj dioj timis lin.

Zeus invitis al solena edziĝfesta bankedo ĉiujn bestojn. Kiam komenciĝis tiu granda tago, la bestoj rapidis al ĝi. Ili ne povis ĝisatendi! Dum ĉiu tago ili povis manĝi siajn la plej ŝatatajn manĝaĵojn, kiom ili volis.

Zeus rigardis ilin kaj gaje ridetis. Poste li eknubiĝis: "Kie estas la testudo?" demandis li al Hera, sia novedzino. "Kial ĝi ne estas ĉi tie?"


Ankaŭ diino Hera rimarkis, ke la testudo ne alvenis kun aliaj bestoj. "Morgaŭ mi demandas ĝin", - diris Zeus.

En alia tago trovis Zeus la testudon, kiu trankvile ripozas sur kota bordo de la rivero. "Testudo, kial vi sola el ĉiuj bestoj ne alvenis al mia edziĝfesta bankedo? Respondu!" -ripetis Zeus. La testudo levis kapon kaj flustris per mallaŭta, timema voĉo: "Ĉie estas bone, sed hejme plej bone."

Zeus ekkoleriĝis. Li tiel laŭte kriegis, ke li timigis birdojn, kiuj kun krio elflugis el ĉirkaŭaj arboj.

"En tiu ĉi kaŭzo vi ĉiam portos vian hejmon kun vi ĉien, kien vi iros!" Poste Zeus kun granda frapo kaj kun blindiga fulmo malaperis.

La testudo en tiu momento sentis, ke io sur dorso penigas ĝin. Estis tio firma, peza kiraso, kiu ĝin tute kovris. La testudo paŝetis for. Videbla estis nur skvama kapeto, pinto de vosto kaj kvar fleksitaj piedoj. De tiu tempo ĉiuj testudoj en la mondo portas sian dometon senĉese sur dorso.



Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Esperantigis Boris Tereĥov [Magadan, Rusio]

Nur 10 aforismoj famigis Moseon por ĉiam!

Homoj ĝis nun dubas, ĉu ekzistas vivo sur aliaj planedoj. Malgraŭ tio ili arogas aranĝi konkurson "Miss Universo".

*

Homoj povas labori kune, sed pigras ĉiu aparte.

*

Karaktero de homo pli bone riveliĝas per ŝerco, al kiu li ofendiĝas.

*

Kiu ne iras antaŭen - moviĝas malantaŭen - staranta situacio ne ekzistas.

*


Amanta virino plej verŝajne pardonos grandan malmodes-tecon, ol malgrandan nefidelecon.

*

Kariero etas bona afero, sed ĝi neniun povas varmigi dum malvarma nokto.

*

Ne indas kreskigi flugilojn, se ne sias, kien flugi.



Igorj Samojlov [Kazanj, Rusio]

Iĝi patro estas tre facile. Esti patro, male, estas tre malfacile.

*

Al amata oni pardonas tion, kion ne pardonus al aliaj, kaj ne pardonas tion, kion pardonus al aliaj.

*

Eventoj kutime disvolviĝas laŭ scenaro, kiu ne estis antaŭvidata.

*

Kondukti sin necesas tiel, kvazaŭ vi estas bone edukita homo.

*

Se instrui stultulon, li ne iĝos saĝa, simple li pli multon scios.

*

Foje ĉevalo diris:

— Sufiĉas sur mi veturi!

Kaj nun per ĝi oni plugas.

*

Dume homo gardas silenton, lia silento gardas lin.

*

Kiam ĉiuj kriaĉas "Hura-a-a!!!", - kian kuraĝon necesas havi, por ne-laŭte diri "SOS"!

*

Jen, okazas en la vivo fiaskoj: ŝajnas, ĉio bonstatas, kaj vi trovis bonan laboron, kaj novan aŭton aĉetis, sed al vi jam estas 80 jaroj!

*

Kiam li trovis sian lokon sub la suno, ĝi jam malsupreniĝis al la horizonto.

*

Por elspezi monon saĝe, necesas havi nur 2 aĵojn. Mem konjektu, kiujn...

*

Estas facile laŭdi iun, dirante:

— Li estas la plej saĝa!

Kaj same facilas mallaŭdi tiun, aldoninte:

— En nia psikiatrejo.

El sia kolekto proponis por “K” **Timur Halilov** [Jekaterinburg, Rusio]

Kolektis kaj esperantigis
Nekludov Oleg [Buzuluk, Rusio]

En teatro oni prezentas operon “Karmen”. En aparta rigardejo apud granda operŝatanto sidas tre babilema virino, kiu malhelpas lin aŭskulti la operon. Post fino de la teatraĵo ŝi diras al li:

— La sekvan dimanĉon oni prezentos ĉi tie operon “Aida”. Venu!

— Nepre venos, mi vin dum “Aida” ankoraŭ ne aŭdis.

*

Turisto sur unu el pacifikaj insuloj demandas indiĝenon:

— Ĉu vi ne timas grimpi sur tiun ĉi altan palmon por kokosoj?

— Sed ni ne grimpas. Ni atendas, kiam la kokosoj mem falos teren pro forta vento.

— Sed se vento mankos?

— Tiam ni havas malsukcesan rikoltan sezonon.

*

Psikiatro diras al paciento:

- Nu, nu, trankviliĝu, ne nervoziĝu, ĉio normalas. Do, rakontu al mi ankoraŭ foje ekde la komenco, kiel ĉio okazis.

— Mu, mi ja diris, dekomence mi kreis Ĉielon kaj Teron...

*

Al iu virino oni donacis belan parcelanan vazon por floroj. Ŝi prenis la donacon kaj neatendite la vazo elfalis el ŝiaj manoj kaj frakasiĝis.

— Oh, kion mi faris! - diris ŝi.

— Ne bedaŭru vi tiel, - trankviligas ŝin la donacinto, - ja tiu vazo jam estas la via.

El lerneja vivo

Demandas la patro:

— Vovoĉka, kiel estas viaj lernejoj aferoj?

— La instruisto diris, ke mi tute ne scias matematikon kaj enskribis en mian poentokajeron iun ciferon...

*

Juna lerneja instruistino plendas al sia koleginino:

— Unu el miaj lernantoj min turmentas per sia fikonduto – bruas, huliganas...

— Sed, ĉu li tute ne havas iujn pozitivajn trajtojn?

— Bedaŭrinde havas. Li ne preterlasas lecionojn.

*

El enketfolio de dungato:

Fremdaj lingvoj: angla – legas, la germana – kun vortaro, la hispana – komencas lerni, la finna – kalkulas ĝis dek...

*

Konfeso

— Prunteprenis al la amiko \$100 kaj li ĉesis al mi telefoni. Tio signifas, ke li memoras pri la ŝuldo

*

Parolas du hundoposedantoj:

— Mia hundo estas tiom saĝa, ke mem promenas, mem per lifto veturas al la 5-a etaĝo, mem sonoras en la pordon.

Ĉu via hundo povas sonori en la pordon?

— Sed por kio? Mia hundo havas la ŝlosilon.

Okazaĵo

Noktumis ĉe bela junulino kaj forirante matene forgesis telefonon. El la oficejo mi telefonis al ŝi kaj ni interkonsentis renkontiĝi dum tagmanĝpaŭzo por mi forprenu mian aparaton. Mi venas, reprenas la telefonon kaj demandas:

— Ĉu sonoris la telefono?

— Jes, tie estas du neresponditaj vokoj.

— Unu estas la mia, kiam mi scrĉis ĝin. Kaj la dua estas de vi. Kial vi telefonis?

— Mi telefonis al vi por diri, ke vi forgesis vian telefonon ĉe mi.

*

En drinkejo

— Pardonu, la drinkejo ekfunkcios post unu horo.

— Bone, mi paciencas...

— Vi povas dume ion mendi por trinki.

*


Erara opinio

Opinio, ke bovino donas al homoj lakton kaj viandon estas erara. Kaj lakton kaj viandon homoj forprenas de ĝi, sen demandi opinion de bovino.

*

En kafejo


Anonco ĉe la enirpordo de kafejo: “Bonvolu veni! Ĉi tie vin mordos nek kelnero, nek la prezoj”.



Karaj legantoj, jam tradicie ni proponas al vi plibonigi viajn sciojn de *E-gramatiko per la sprita leciono!*

Johan' Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Babilado 19



Saluton, karaj!

Esperable por multaj el ni revenis pli bela vetero.
Zamenhof diris:

Se neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo (2259)

(ĉiu kaŭzo havas sian efikon, kaj reciproke)

”*estas malvarme*”: **kiam ne ekzistas subjekto, oni uzas adverbon**, E-vorton: *estas malvarme* (kaj ne *malvarma*). Tio estas malfacila por kelkaj el ni, kies naciaj lingvoj ne distingas inter adjektivo, A-vorto, kaj adverbo, E-vorto.

La ĉielo kovriĝis je nuboj, ĝis tondris kaj fulmis (en Rakontoj de Andersen, tradukitaj de Zamenhof, en Libro 1a, sur paĝo 53a).

Tondris, fulmis, kiel la antaŭa *neĝas*, ne havas subjekton en Esperanto, do oni uzus adverbon: *tondris forte; fulmis terure*

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas

Senĉese, senfine, senhalte

(komenco de Zamenhofa poemo: Pluvo)

Li povus diri: *sen ĉeso, sen fino, sen halto* sed Esperanto tre uzas adverbojn, kiuj lert-igas, malpez-igas la stilon de nia lingvo.

Frosta multe pli kruele, ol antaŭe

(Rakontoj de Andersen, L. 3a, p. 26a)

De-nove du E-vortoj, kun verbo sen subjekto.

Frost- = kiam grundo gelas. Jen memor-ilo (*mnemoniko* diris Zamenhof, kaj diras eminent-uloj, akademianoj) por tiuj, kies nacia lingvo ne konas tiun radikon: televidaj filmoj pri Siberio parolas pri "permafrost", senhalta grundo-gelo. *Ĉu vi neniam aŭdis tion? Ne rigardu nur "Dallas"!*

Aliaj meteologiaj (rigardu bone, kiel tio skrib-iĝas en Esperanto) vortoj: *hajl-* kiam falas glaci-eroj; *prujn-* kiam nebulo glaci-iĝas. *Hajl-* de-venas de la lingvoj ĝerman-idaj; *prujn-* de la latina, en kiu ĝi parencis kun nia medicina vorto *prurito*, tio estas *juk-ado, brul-umo*, ĉar malvarmon nia haŭto povas ankaŭ senti kiel brulumon.

Meteorologio = studo de atmosferaj fenomenoj. *AtmosFer-, Fenomen-*: Esperanto tie uzas *F*, kiel la lingvoj itala, hispana, kiam aliaj (franca, angla) uzas *PH*.

Ankaŭ al ni la suno eklumos (94)

(Ni ne perdu kuraĝon; ankaŭ al ni venos pli bonaj tagoj)

ek-lumi = *brili*. *EK-* indikas: la **komencon de afero**, kiu eble daŭros: *vespere ni ekdormas*; aŭ male **subitan aferon**, kiu ne daŭros: *mi ekvidis skolonon, kiu tuj zigzage malaperis en la arbaron*.

El klara ĉielo tondro ekbatis (455)

(subite okazis io neatendita)

Fendita ligno facile ekbrulas (584)


(evento ne okazas sen antaŭ-evento).

Kontraŭ-diro kun la ĵus antaŭa alia proverbo, ĉu ne? Nu, ne nur politikistaj diroj entenas kontraŭ-dirojn; ankaŭ proverbojn.

Sufiĉas kun vetero kaj kun *EK-*! Antaŭ nia televidilo ni nun povas *EK-*sidi aŭ *sid-IĜI*, ĉar kun verboj de stato, *EK* = *IĜI*: *eksidi* = *sidiĝi*; *ekstari* = *stariĝi*; *ekkuŝi* = *kuŝiĝi*. Sed kun aliaj verboj ili ne similas:

Ni nun *ek-dis-iĝu*: ĝis la venonta fojo!

Johan-Luko



Utile. Interese. Ĉarme.

Junulara Kongreso - 64

Szombathely, Hungario, 2008

Arina Osipova [Jekaterinburg, Rusio]

Jam ne estas sekreto, ke esperantistoj estas neordinaraj homoj. Ili eĉ preferas ripozi interese, utile. Certe, por ĉiuj ĉarma kompanio, bona etoso, bela naturo ludas grandan rolon. Sed esperantistoj havas unikan eblecon – ricevi profiton eĉ ne rimarkante tion. Ĉar ili senĉese progresigas sian lingvoscion, konstante praktikante kaj Esperanto iĝas labora lingvo dum ĉiuj aranĝoj de la verda popolo. Kaj tute ne gravas, ĉu tio estas kunveno, festo aŭ tendaro.

Sendube la plej bona metodo praktiki la lingvon estas komunikado kun alilandanoj, kiam neniu havas eblecon krokodili. Nur tiam vi vere provos esprimi viajn ideojn, viajn emociojn Esperante, por interparolantoj korekte komprenu vin. Sed kie vi povas plej rapide trovi esperantistojn el ĉiuj lokoj de la mondo? Certe, en internaciaj kongresoj.

Unu el tiuj aranĝoj estas IJKo - Internacia Junulara Kongreso. Ĉi-jare ĝi okazis en Hungario.


Estis interese kaj agrable ekscii, ke ne nur gejunuloj vizitis tiun ĉi aranĝon, sed ankaŭ jam spertaj esperantistoj. Kaj tio ne estas strange kaj mirinde, ĉar esperantistoj ne havas aĝon. Ĉiam ni sentas ke ni ĉiuj estas amikoj, ke malgraŭ la aĝoj ni ĉiuj estas egalaj. Kaj facile troviĝas temoj por babili aŭ por diskuti.

Sed ne indas forgesi ankaŭ pri via gepatra lingvo, kiu foje povas bone helpi vin. Al tiu ĉi IJKo venis unu italo, kiu tute ne posedis Esperanton, sed evidentiĝis ke li kapablas paroli ruse. Kaj mi tradukis por li ruse ĉion, kion parolis la organizantoj esperante, por ke kompatinda italo povu ion kompreni kaj aliĝi al la aranĝoj. Estis vere amuze. Mi ne nur helpis al la homo, sed mem neatendite havis praktikon kiel tradukisto. Ankaŭ tio estis utile.

Dum la tuta kongresa semajno Esperanto estis uzata por ĉio. Okazis tradiciaj lecionoj por plibonigi lingvoscion, oni montris esperantajn filmojn, en Esperanto okazis prezentadoj de diversaj Esperanto-aranĝoj. Internacia esperanta aranĝo helpas ne nur bone praktiki la lingvon, sed ankaŭ konatiĝi kun aliaj kulturoj kaj tradicioj.

Por tiu celo estis organizita Kultura Lingva Festivalo, kie reprezentantoj de diversaj landoj prezentis siajn naciajn dancojn, kantojn, manĝaĵojn, lingvojn. La Festivalon povis viziti ankaŭ ekstera publiko.

Krom tio estis ĉiutagaj promenadoj tra la urbo, muzeoj, okazis multaj interesaj ekskursoj... Kaj ĉie regis Esperanto: en aero, en ĉielo, en ĉiu strato oni aŭdis esperantajn vortojn, ĉar por unu semajno denove aperis nia amata Esperantujo, kie ĉiu homo estas feliĉa, kie homo ne havas problemojn kaj zorgojn, kie homo povas nur ĝui la vivon. Kaj ĉiuj tiuj agrablaĵoj okazas dank' al Esperanto!




JUNE kaj KUNE



JUNE kaj KUNE



JUNE kaj KUNE



JUNE kaj KUNE

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas budista monaĥo kaj sekvas tibetan tradicion. Mi deziras komunikiĝi kun esperantistoj de aliaj landoj pri muziko, opero, religioj, malsamaj kulturoj.

Jean-Marc Gandit
15 rue Thiergarten
67000 Strasbourg
Francio

Mi estas 18 jara studento. Mi studas historion kaj geografion. Int: muziko (jazo), desegni.

Senet Benoit
Nismes
Belgio
senet.benoit@hotmail.com

Mi estas 18 jara viro, komencanto. Mi deziras vojaĝi tra la mondo.

Tom Dolman
Beverley
Britio
kingdolman@hotmail.co.uk

Mi estas 40 jara virino, komencanto. Mi ŝatus korespondi kun ĉiuj landoj. Tre plaĉas al mi vojaĝi, legi, promeni.

Csilla Varga
Aidinger J. u. 50 II/8
7632 Pécs
Hungario
amarea@t-online.hu

Mi estas 30-jara komencanto. Mi ŝatus komunikiĝi kun la mondo kaj ŝatus lerni lingvojn. Int: vojaĝoj, historio, klasika muziko, kino, ktp.

Gwendoline Declercq
Paddenvijverstraat 38
9300 Aalst
Belgio
guido.blondeel@pandora.be

Mi estas 16 jara germana lernanto, mi ŝatus skribi leterojn. Mi estas ĵonglisto, gitarludisto, ŝatus legi librojn, vojaĝi ktp. Se vi estas homo, kiu aĝas inter 12 kaj 20 jaroj, bonvolu skribi al mi.

Max Allmendinger
Hoher Pfad 19/5
71640 Ludwigsburg
Germanio

Voroncova Nadejda [Jekaterinburg, Rusio]



Agrablaj surprizoj por la amikoj!

Mi estas 30 jara viro. Mi programas kaj administras komputilojn por la Universitato de Kalifornia, Santa Cruz. Mi ŝatus kuiri, legi, vidi filmojn, kaj ludi komputilajn-ludojn. Mi preferas korespondi kun aliaj komencantoj aŭ spertaj Esperantistoj

Bill Stivers Jr.
Aptos, Kalifornio
Usono
stiversb@mac.com

Mi estas 30 jara virino, mi ŝatus muzikon (mi ludas fluton kaj pianon), promeni, kuiri kaj lerni lingvojn. Mi serĉas amikojn tra la tuta mondo.

Lorna Davies
19 The Leys,
Cradley,
Malvern, Worcestershire
WR13 5NU
Britio
lorna.davies2@virgin.net

Mi amas legi kaj kompreni Esperanton. Sed mi ne havas vortaron por traduki kelkajn vortojn. Tial mi petas: ĉu iu povas sendi al mi vortaron (franca-esperanta kaj esperanto-franca)? Mi kun ĝojo antaŭdankas!

Profesoro
Josu Kiangrbeni
Nzolani
B.P.761 / Kinshasa 11
Kinshasa, Dem. Resp.
Kongo
kiangbeninzolani@yahoo.fr

Mi estas 55 jara viro, mezlerneja instruisto de la rusa lingvo. Dum milito en eksa Jugoslavio mi estiĝis aerdefenda oficiro. Mi estas eksedziĝinta. Int.: humanismo, unitarianismo, Esperanto. Mi multe aktivis surkampe de neregistaraj organizoj. Mi ŝatus klasikan muzikon, naturon kaj ŝatus vojaĝi. Mi deziras amiki kun similaĝaj gesimilideanoj.

Bozidar Horvat
Zagreb,
Kroatio
michael.servetus@post.t-com.hr

Mi estas 19 jara studentino, komencantino. Mi studas en universitato por iĝi tradukistino. Mi lernas la anglan kaj la francan kaj memstare germanan, hispanan, Esperanton. Int: lingvoj, literaturo, muziko, korespondado. Mi serĉas samaĝajn korespond-geamikojn el la tuta mondo. Mi estos tre ĝoja scii pri aliaj landoj.

Elena Lyamar
Perova, 7/13
Perevalsk
Luganskaya obl
94300
Ukrainio
chrisantema56@mail.ru



Esperanto
Koresponda
Servo
<http://www.esperantofre.com/eks>

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

